WIKIPEDIA

Komia lingvo

Komia makrolingvo estas makrolingvo el perma lingvaro de finn-ugra lingvaro. Ĝi estas parolata en Komiio, Permja regiono kaj Kirova provinco. La makrolingvo konsistas el dialektoj, kiujn oni povas disigi en la tri parencajn grupojn:

- La komi-zirjana lingvo , aŭ simple la komia lingvo (Коми кыв) estas la plej granda grupo. Ĝiaj dialektoj estas parolataj en Komiio kaj apude. Ekzistas la literatura normo de Komi-Zirjana lingvo, kiu estas oficiala en Komiio. En 2010 estis ĉ. 160000 parolantoj.
- La komi-permjaka lingvo (Перем коми кыв / коми-пермяцкӧй кыв) estis parolata en la Permja regiono, kie en 2010 estis ĉ. 63000 parolantoj de ĝi. En la Komi-Permjaka distrikto de la Permja regiono la lingvo havas oficialan statuson.
- La komi-jodza lingvo (Коми-Ёдз кыл, nomata laŭ la rivero Jazva) estas parolata fare de malgranda izolita grupo de komioj, loĝanta en Krasnoviŝerska distrikto de la Permja regiono. Oni rigardas la komi-jodzan lingvon aŭ aparta lingvo, aŭ dialekto de la komi-permjaka. Estas ĉ. 2000 parolantoj de la komi-jodza.[1]

Ĉiuj komiaj lingvoj estas skribataj per cirilaj alfabetoj.

Komia makrolingvo	
Коми кыв	
Parolata en	Rusio
Regiono	Komiio, Permja regiono, Kirova provinco
Parolantoj	225 000
Skribo	Cirila alfabeto
Lingvistika klasifiko	
Urala	
Finn-ugra	
Finno-perma	
Perma lingvaro	
Komia makrolingvo	
Oficiala statuso	
Oficiala lingvo en	Komiio
Lingva statuso	3 sendube endanĝerigita
Lingvaj kodoj	
Lingvaj kodoj	
ISO 639-1	kv
ISO 639-2	kom
ISO 639-3	kom
SIL	KOM
Glottolog	komi1267
Angla nomo	Komi
Franca nomo	komi

Referencoj

1. ↑ Ager, Simon (ed.). Komi (https://www.omniglot.com/writing/oldpermic.htm). *Omniglot: writing systems & languages of the world*. Alirita 2020-12-04.

Oficialaj lingvoj de Rusio	
Tutŝtata oficiala (ŝtata) lingvo	rusa (→)
Lingvoj oficialaj (ŝtataj) en federaciaj subjektoj	abaza · avara · agula · adigea · azerbajĝana · sudaltaja · baŝkira · burjata · dargva · inguŝa · kabarda-ĉerkesa · kalmuta · karaĉaja · komia · kumika · laka · lezga · nogaja · maria · mokŝa · oseta · rutula · tabasarana · tatara · tata · tuva · udmurta · ĥakasa · caĥura · ĉeĉena · ĉuvaŝa · erzja · jakuta
Lingvoj kun oficiala statuso	vepsa · dolgana · kazaĥa (→) · karela · komipermjaka · mansa · neneca · selkupa · finna · ĥanta · ĉukĉa · evenka · evena · jukagira

Elŝutita el "https://eo.wikipedia.org/w/index.php?title=Komia_lingvo&oldid=6826161"

Ĉi tiu paĝo estis lastafoje redaktita je 17:06, 4 jan. 2020.

La teksto disponeblas laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite-Samkondiĉe 3.0 Neadaptita; eble aldonaj kondiĉoj aplikeblas. Vidu la uzkondiĉojn por detaloj.